

## El fervoja mondo 6.2019

Ĉeĥio:

*Czech Raildays 2019 en Ostrava*

Jam dudekan fojon en varstacio en nordmoravia metropolo *Ostrava* okazis tradicia ekspozicio de relveturiloj, novaj informteknologioj kaj manipulada tekniko *Czech Raildays*. Al tri tre varmaj tagoj, en kiuj la foiro kun partopreno de ĉirkaŭ ducent ekspoziciantoj okazis, apartenis ankaŭ dutaga faka konferenco kun direktiĝo al aktuala stato de fervojoj en Ĉeĥa respubliko.

Ĉeĥaj Fervojoj ĉijare en *Ostrava* ekde 11a ĝis 13a junio prezentis kiel prototipon de moderna pasaĝervagono serio *Bdmtee* de la firmao *DPOV* por regionaj trajnkunligoj, tiel ankaŭ modernigitan unuaklasan pasaĝervagonon kun "bistro" (malgranda gastejeto por rapida refreŝiĝo) de la serio *Armpee*, kiu jam en nombro da kelkaj veturiloj trafikas en longdistancaj trajnkunligoj.

Mankis nek duveturila elektra trajnkompleto de serio *650 RegioPanter*. Ĉi tiu, kvankam jam en pli modernigita efektivigo plimultigos veturilaron de la nacia trafikisto en venontaj jaroj.

"Ĉeĥaj Fervojoj estas tradicia partnero kaj ekspozicianto en la plej granda ĉeĥa foiro de fervoja tekniko, kie fariĝis tuta novaĵo modernigita pasaĝervagono por regionaj pasaĝertrajnoj de serio *Bdmtee*. Ĝuste tiu ĉi povas esti ĝi racia ekonomia alternativo enkadre modernigo de veturilparko por regiona trafiko", diris vicprezidanto de la prezidantaro *ČD Radek Dvořák*. Membro de la prezidantaro kaj ĝenerala vicdirektoro *ČD* por ekspluatado *Michal Vereš*, kiu tiun ĉi veturilon en la foiro solene baptis kune prezidanto de prezidantaro de la filia kompanio *DPOV Roman Kott*, aldonis, ke la vagono *Bdmtee* ricevis tute novajn sidilojn kun tekstila drapirado. Malmultigo da nombro de la sidiloj alportos pli grandan komforton. Kompreneblaj estas elektraĵ enŝovigiloj 230 V, *USB* konekto por ŝargado de elektroniko aŭ nova aŭdiovizuala informada sistemo kun *LCD* monitoroj.

### Venis ankaŭ trakciiloj

Kompreneble okazis ankaŭ ekspozicio de trakciiloj. Prioritaton en ekspozicio de relveturiloj prezentis ankaŭ du reltrakciiloj de fabrikisto *CZ LOKO* el *Česká Třebová*. Admirata estis hibrida duradaksa lokomotivo *HibridShunter 400* kiel absoluta novaĵo enkonstrue programita de la firmao. La fabrikaĵo estas destinita precipe por manovrada servo, kie movigon plenumas trakcia baterio. Tiu ĉi estas ŝargata de la sistemo *plug-in*, do el ŝtopirkesto de ekstera ŝargigado. Ekbruliga motoro tipo *CAT C4.4* servas rezerva por tre kurtaj (mallongaj) alveturoj.

El *Česká Třebová* oni venis fanfaroni ankaŭ kun kvarradaksa potenca trakciilo *EffiShunter 1000*, devenanta el kvinpeca serio por filia kompanio de Ĉeĥaj Fervojoj *ČD Cargo*. Tiu ĉi veturilo havas ekbruligan motoron kun povumo 895 kW kaj vastspaca plialtigita kajuto, ebliganta al lokomotivisto bonan elvidon sur linion. Certe ne estas seninteresa, ke ĉiuj *EffiShunteroj* estas jam en konstruado ekipataj de sekureca sistemo *ETCS*.



### Vartrajnaj lokomotivoj kaj komponantoj

Kiam ni jam menciis la kompanion *ČD Cargo*, ni aldonu, ke *Newag Gliwice* pretigis elektran lokomotivon tipo *Dragon E6ACT*. La industriaĵo aperis en kunlaboro kun *Instytut Elektrotechniki Warszawa* kaj projekta kancelario *EC Engineering*, devenas el familio de sesradaksaj lokomotivoj por trafikado sur linioj elektrizitaj de kontinukurenta sistemo 3 kV. Meze de elektraĵ sesradaksaj trakciiloj mankis nek lokomotivo *Vectron* de la firmao *Siemens*, destinita por la pola trafikisto *PKP Cargo*. Sian lokon havis ankaŭ speciala kvarradaksa vagono tipo *VT 420*, kapabligita por testi teknologiojn de sekurecaranĝoj de la firmao *Thales*. La veturilo, alinomata *Lucy*, estis origine uzata en regiona trafiko en Germanio.

Al la foiro venis ankaŭ modernigita *RegioSprinter* de la firmao *AŽD*, kiu prizorgos sur *Prujna linio* kun numero 113 de la ĉeĥa horaro ekde decembro 2019 regulan trafikadon. Interalie, tiu ĉi linio servas primare kiel prova poligono de la kompanio *AŽD*.

Al la bildoj: Adaptita veturilo *Bdmtee*

## **Eŭropa Unio:**

### **Fervoja vartrafiko en Eŭropo plikreskas**

Povumo de fervoja vartrafiko en Eŭropo en la jaro 2017 atingis preskaŭ samajn rezultojn kiel en 2016, kiam ĝi kreskis precipe ĉe ŝtataj fervojoj de Pollando, Italio kaj Aŭstrio. Ĉefa alkresko estis kaŭzita precipe pro okazanta kombinita vartrafiko sur akso nordo – sudo. Krom belgaj *Lineas*, kie okazis radikala reorganizo, alkresko okazis ĉe fervojaj vartrafikaj entreprenoj *PKP Cargo*, *Mercitalia* kaj *Green Cargo*. Precipe *PKP Cargo* denove venis en profiton. Aliaj entreprenoj, kiel ekzemple aŭstra ekspluatanto *Rail Cargo Aŭstria*, profitis plejparte de bona ekonomia situacio en Eŭropo. En Germanio okazis en statistikaj rezultoj de trafika povumo korekto de alkresko 13 miliardoj da tunokilometroj, plikreskinta trafika povumo tiel estis kaŭzita de pli bona povumo de privataj fervojaj entreprenoj, kiuj en lastaj tri jaroj senĉese plibonigas sian kvocienton en la merkato. Aliaj ŝtataj vartrafikistoj sukcesis malkreskon de siaj kvocientoj en trafika merkato haltigi. Ofte tio okazas malprofite de plibonigo de ilia pozicio en eksterlando, krom enlanda merkato.

Trafika povumo en la jaro 2017 en Eŭropo kreskis al 469 mld da tunokm kaj por sekvantaj du jarojn estas antaŭvidata povumo 474 mld da tunokm. Plejparte tio okazas sur merkatoj de Visegrada kvaropo (Pollando, Ĉeĥio, Slovakio kaj Hungario) kaj en Slovenio. Ĉefa kialo denove estas kombinita trafiko el marhavenoj. Por plia kreskado de trafika povumo tamen estas bezonataj investoj en fervojan infrastrukturon, digitaligo, aŭtomatigo kaj plirapidigo de translimaj transportoj.

(Laŭ *Transportweb*, 29. 3. 2019)

## **Francio:**

### **Altrapida trajno por transporto de konteneroj**

Kompanio "*Emeuric Gleizes*" el Francio akceptis ideon por transporti kontenerojn en altrapidaj trajnoj *Transrapid* sur elektromagneta kuseno. Por konstruo de vagonoj de la trajno "*Spacetrain*" estos uzataj ekskluzive aluminiuj fadenoj. Aera kuseno ricevos energion el baterioj, kiuj estos muntitaj sur tegmentoj de la trajno. La trajno povus atingi meznivelan rapidon 540 km/h, ĝis ses jaroj de post enkonduko en trafikadon ĝi tamen povus trakti ĝis per rapido 740 km/h, kiel estas anoncita en la projekto.

Por trafikado de konteneroj la kompanio evoluigis specialajn veturiltrajnojn. La trajno *Spacetrain* povus fariĝi 2,5oble pli konvena ol konvenciaj trajnoj sur reloj. Kiel energio por movigo povus esti uzata ankaŭ bioetanol. La trajno povus esti laŭplane unuan fojon prezentita en duono de junio en *Bourget* (Francio) en internacia aviada kaj kosma salono. Nuntempe la kompanio serĉas partnerojn en industrio por financado de konstruado de la testada linio, kiun oni planas konstrui en proksimeco de la urbo *Saran* sude de Parizo. La unuaj testadaj provveturoj de la trajno *Spacetrain* estas planataj fine de la jaro 2020.

(Laŭ *Transportweb*, 29.3. 2019)

Preparis Jindřich Tomášek  
Grafike aranĝis Václav Nosek